


# LABORISTO

**Organo por esperantistoj senŝtatanaj**

3:a jaro Oktobro 1936 N:ro 26 Abonprezo: 5 fr. fr. pojare


## LA DEMOKRATIOJ PERFIDAS HISPANION

C.D.H.S.-A.E.P. Barcelona



Oni ne trovas vortojn por esprimi la senliman indignon, kiun hodiaŭ sentas la tuta liberema mondo pri la rezigna sinteno en la hispana batalo de la t. n. demokrataj ŝtatoj. Por, laŭ sia falsa imago, ŝirmi la demokratiojn k la pacon en Eŭropo, la demokratioj oferas landon post lando sur la sanga altaro de la faŝismo. La sorto, trafinta Abesinion, minacas nun Hispanion, post eventuala faŝistvenko en tiu lando venos la vico al Francio, Anglio k aliaj landoj. La malgrand-nacioj estas de la faŝistoj konsiderataj kiel bagatelaĵon, ĉar ili devos sekvi la sorton de la grandnacioj. Ne estas imageble, ke ekz. Nederlando, Danio, Svedio aŭ alia landeto estos indulgata je eventuala faŝistvenko en Eŭropo. Ne estas penseble, ke la sveda "popolhejmo" estos de la faŝistoj lasata daŭre evolui laŭ propraj deziroj k planoj, kiujn la "plejmulto" esprimis ĉe la lasta baloto al la parlamento.

La faŝismo indulgas nenion kultur-progresigan. Ĝia batalo nek koncernas ian idealan naciismon nek ian prirasan aferon. Ĉio tio estas nur senenhavaj demagogiaj frazoj, kies celo estas trompi la amasojn. La nura celo estas subpremi la ideon pri socialismo, sufoki la liberecemon, restarigi la klasprevilegiojn k reenmeti la homaron al nigra, mezepoka stato. La faŝismo estas bloko de ŝtate organizita krimularo, per kies helpo la mondkapitalismo nun intencas refortigi sian grave minacatan pozicion. Estas niatempa taktiko de la internacia reakcio.

La faŝisma minacigo pri la komunismo k rusa bolŝevismo estas ankaŭ nur blufo. La bolŝevismo havis dum la lastaj jaroj malgrandan influon en la eŭropa politiko. Ĝi limiĝis ĉefe al Sovetio, kie ekzistas ia speco da nacisocialismo, kiu servas kiel bona modelo al la "Tria Regno. Tiel malforta estis la ideo pri la strukturo de la nacia socio, ke la faŝistoj devas imiti la planojn de siaj, laŭ mema aserto, plej grandaj malamikoj. Ke la faŝistoj ne diferensigas inter bolŝevistoj, socdemoj, burĝaj liberemuloj, anarkistoj k sindikalistoj estas sufiĉkonate, ili metiĝas en la samaj turmentejoj k estas samkruele traktataj k murdataj.

La naciismo ne estas sankta afero por la faŝistoj. Ili oferas volonte sian landon al insurgentoj nur por povi realigi siajn abomenajn planojn por subpremi la spiriton de la socialisma ideo.

La faŝismo ne elkreskis el nacia tereno. Internacia reakciularo, blankrusaj rifuĝantoj, militistoj, pastroj k aliaj homoj devenantaj el aristokrata k grandkapitalista medioj estas la kreantoj de la faŝismo. Per ĝi ili venĝas pro perditaj privilegioj. Ke la faŝismo ne estas zorganta pri la sorto de la

ATENEU ENCICLOPÈDIC POPULAR
CENTRE DOCUMENTACIÓ HISTÒRICO-SOCIAL
Passeig de Sant Joan, 26, 1er. 1a
08010-BARCELONA

C.D.H.S.-A.E.P.
Barcelona

# EMMA GOLDMAN PAROLIS EN BARCELONO

Ĉe mitingo en Barcelono, organizita de C.N.T. parolis Emma Goldman antaŭ 10 mil homoj. La parolado estis radiita tra la tuta Hispanio. Ni kompile redonas la ĉefenhavon ĉi sube:

En la nomo de la angla, amerika k kanada laboristaroj mi salutas vin. Pere de via heroa batalo, kontraŭ la faŝismon por niaj ideoj, ricevis ankaŭ la alilandaj laboristoj novajn impulsojn. Ni ĉiuj estas firme decidantaj apogi vin ĝis nia lasta sangoguto.

Mi konfesas k komprenas, kiel ĉiuj gek-doj en Eŭropo, ke vi unue devas koncentri ĉiujn viajn fortojn por repeli la nigrajn regresigajn fortojn, kiuj hodiaŭ minacas vian liberon; fortoj, kiuj en aliaj landoj metas la popolojn en sklavecon.

Kiam vi estos liberigintaj Hispanion de tiu ĉi terura skurĝo, la fundamento de la faŝismo ankaŭ ŝancelos en aliaj landoj. Via heroa batalo havas tial universialan signifon. Mi scias pli ol bone, ke necesas eltenemo k kuraĝo por konduki tian aferon, kiel vian, al venko, sed mi ankaŭ scias, ke ĉiuj necesaj kvalitoj estas de vi posedataj. Tial vi venkos.

Mi estas en Hispanio nur depost kelkaj tagoj. Dank' al la helpo de C.N.T.-F.A.I. mi jam havis okazon vidi kiel vi, sangbatalante por likvidi la faŝismon, ankaŭ flanke de tio okupas vin pri pozitiva rekonstru-laboro.

La entreprenoj, de mi vizitataj k la konstruaĵoj de vi konfiskitaj, troviĝas en la plej bona ordo, k oni ne povas sur ili vidi ke Barcelono estas trafita de interna milito. La vivo k laboro daŭras sub via kontrolo k funkcias pli bone ol dum la tempo de privata posedanteco. Per tio vi pruvis ke la jenaj vortoj de nia granda instruanto Bakunin estas pravaj: "la emo detrui estas emo de l' kreo", k vi faris ankoraŭ pli. Vizaĝ' al vizaĝo kun danĝero k morto vi ankaŭ montris, ke la anarkosindikalismo estas la plej efektiva socialismo, kiu indas ke oni vivas, batalas k mortas por ĝi.

Vi k-doj en Barcelono k tuta Hispanio donis al la eksterlandaj laboristoj lecionon pri sociala revolucio. Vi lernis de la pasintaj revolucioj, ke la revoluciaj fortoj ne povas ŝirmi la revolucion sen tuja aranĝo de manĝ- k vestaĵoj por la popolo. Via forto k sekureco ne troviĝas en potenco de ŝtato aŭ politika partio, sed en la konstruigaj fortoj dum la revolucia periodo. Via granda eksperimento DEVAS sukcesi. Kiaajn la finrezulto de via batalo estos, vi tamen, malgraŭ ĉio, metis profundajn postsignojn en la korojn k cerbojn de via popolo k la subprematoj de la tuta mondo.

Depost 45 jaroj estas mia idealo la sama kiel via k restos la sama ĝis mia lasta enspiro. Mia sola deziro estas laŭ kapabloj partopreni en via batalo.

Vivu C.N.T. k F.A.I., vivu via batalo por liberigo de la homaro!

---

**Montru solidarecon al niaj hispanaj k-doj! Ilia batalo estas nia batalo**

---

nacioj pruviĝas, precipe nun, en Hispanio. La fifama generalo Franco (Franko) estas hodiaŭ preta dispecigi k fordonaci grandajn partojn de tiu lando, kiun li asertas savi el minaca danĝero. Li per fordono de sia patrio rekompencas al tiuj, kiuj helpis savi al li lian patrion. El Maroko li liveras duonsovaĝajn milithordojn, kiuj buĉas la filojn, perfortas la filinojn k ruinigas la urbojn, vilaĝojn k kampojn de la hispana nacio. Malgraŭ tiu sakreligio kontraŭ la sankta naciismo protestas nek Hitler-Musolino nek alilandaj cent-procentaj patriotoj. Tiu ĉi pruvas, ke la faŝista naciismo estas nur abomenega blufo, blufo k reeblufo,

Estas la diversespeca reakciularo el ĉiuj koloroj, kiu sub la nomo de l' faŝismo provas realigi sian deziron remeti homaron en mezepokan staton. Kiel nigra inkubo ĝi superŝvebas la mondon. Teritorio post teritorio estas de ĝi konkirata. Sango, kadavroj k ruinoj markas ĝian vojon.

Kontraŭ tiu mond-danĝero batalas nun la hispana popolo. Kontraŭ bone dresitaj k ekzercitaj milithordoj, armitaj de italaj k germanaj faŝistoj, batalas nun ĉifone vestitaj, nearmitaj popolamasoj. Per siaj mortitaj korpoj provas tiuj idealistoj bari la vojon por la alŝtormanta faŝismo.

La demokratioj mutsilentas dum la popoloj postulas tujan solidaran helpon al la hispanaj antifaŝistoj. En Ĝenevo oni prokrastas k esploras k denove prokrastas; la rezulto estas jam konata el Abesinio.

La demokratioj perfidas sin mem k tiel donas la plej efektivan helpon al la faŝistoj. Ili fosas sian propran tombon.

Ni kiuj komprenas kiel mondgrava estas la antifaŝista batalo en Hispanio devas per niaj vokoj veki la mondkonsciencon. Nia voko estu: Helpu la hispanan popolon! Donu al ĝi armilojn k aliajn bezonaĵojn! FORIGU LA BOJKOTON KONTRAU HISPANION!

adr.

# Kamaradoj Atentu!

HELPU LA HISPANAJN LABORISTOJN! KONTRAU LA HITLER-MUSOLINO-FAŜISMO!


La stokholma grupo de DAS en eksterlando eldonas poŝtkarton (grandformate) en nigr-ruĝa koloro kun la ĉi tie prezentata kliŝo. La eventuala gajno estas tute dediĉata al C.N.T-F.A.I. k la Erik Mùhsam-Fondo, kiel ankaŭ por la starigo de radio-elsendoj de la germanaj k italaj antifaŝistoj el la centro en Barcelono.

KAMARADOJ HELPU NIN! MENDU TUJ! HELPU NIN!

Laŭ komisio Schach

MENDU ĉe: D.A.S., poŝtfako 415, STOKHOLMO, Svedio.

La prezo estas: por du kartoj unu internacia respondkupono, je mendo da pli granda kvanto aparta rabato.




A.B.F.

# Niaj samideanoj ne ripozas

La 4:a landa konferenco de A. F. P. (anark. feder. pola.) okazis la 15-17 de Aŭg. 1936. La konferencon ĉeestis deligitoj el diversaj partoj de la lando (el vojevodoj: krakovia, varŝava, bialostoka, silezia, lvova, lodza k la sekretario de A. F. P.)

La deligitoj asertis, ke malgraŭ malfacilaĵoj teknikaj k aliaj - la movado anarka konkeras al si lokon inter la proleta amaso, kion pruvas faktoj de okazintaj strikòj, okupecaj kun venka rezulto k la aktiva partopreno de anarkistoj en sangobataloj laboristaj kontraŭ la polico.

La manko de responda propagando-literaturo sentigas sin malforto de l' organizacio.

Ĉiuj delegitoj helpas sin reciproke en disvastigo de eldonaĵoj propagandaj, kelkaj ricevas helpon teknikan de la organizacio.

La sekretario de A. F. P. informas, ke malgraŭ malfacilaĵoj ĝi estigis tutan vicon da kontaktoj k aperigis iujn eldonaĵojn.

Post diskuto pri la raportoj oni akceptis vicon da proponoj.

La 4:a konf. landa A.F. P. serene honoris la falintajn k vunditajn gelaboristojn k kamparanojn en la heroecaj klasbataloj en-kaj eksterlande.

MARIA SILVA (LA LIBERTARIA) MURDITA.

Unu el la konataj k-dinoj en Hispanio, Maria Silva, konata sub la nomo La Libertaria, estas fuzilita de la faŝistaj banditoj. Maria Silva estis filino de la anarkisto "Seisdedos", kiu bruliĝis vivanta en Casas Viejas.

Maria Silva kunvivis kun Miguel P. Cordon, kiu ankaŭ estas konata batalanto en Cadiz. En tiu loko estis la antifaŝista fronto venkita pro malbona sirmiĝo. Nur kelkiuj estis netrafataj de la sangelverŝado. Inter ili estis Cordon, kiu sukcesis rifuĝi al Ronda, sed lia patrino, fratino k Maria Silva restis en Paterna de Rivera. Ĉar la faŝistoj ne sukcesis kapti Cordon, ili anstataŭ venĝis al liaj parencoj. La patrino, fratino k edzino de Cordon estis fuzilitaj Sen juĝo k esploro estis la tri virinoj murditaj por kontentigi la sadistajn inklinoj de la faŝistoj.

---

La konferenco esprimas solidaron k fratecan rekonon al la organizacioj C. N. T.- F. A. I. en Hispanio; deziras al ili tutplenan venkon.

Eldonos alvokon pri hispana revolucio k kolektos monon. Post tio estis proponoj akceptitaj, kiuj poste estos publikigataj.

Poste estis akceptita la abdikto de la sekretario de A.F.P. Esprimante al ĝi konfidon oni elektis novan kun translokiĝo de la ekzekutivo al aliaj lokoj.

C.D.H.S.-A.E.P
Barcelona

# El Musolinio

Spite gloraj paroloj k pompaj demonstracioj la tempo ne estas tiel favora por Italio, kiel volas kredigi Musolino al la mondo.

Abesinio ankoraŭ ne estas profitdona por Italio k la ekonomiaj cirkonstancoj ĉiam pli k pli malfaciliĝas. Sub la premo de mizero k pro la influo de la okazintaĵoj en eksterlando ( la hispana batalo kontraŭ la faŝismon por la sociala revolucio) oni povas rimarki pli viglan agitadon interne de la amaso. Dum la lastaj semajnoj estas arestitaj centoj da homoj en diversaj urboj. Laboristoj k intelektuloj k verŝajne eĉ malkontentaj elementoj el la faŝista partio viktimiĝis. En Treviso sumiĝas la nombro da malliberigitoj 150, en Turijn estas arestitaj 30 laboristoj ( el la grupo Giustizia e liberta ) k en Turni oni arestis 300.

En la fino de Aŭg. estas arestitaj 200 personoj pro la fakto, ke bomboj eksplodis apud du policestrejoj. 300 laboristoj, el Montfalcono, Pola k St Mare apud Triest, estas arestitaj pro monkolekto por la hispanaj laboristoj.

Ankaŭ en Rome, Liverno, Grosseto okazis amasarestigoj. Ĉi ĉio okazis pere de la "Ovra" ( sekreta ŝtatpolico). La itala soc-demokrato Modigliani skribis en la "Internationala Information" ke trafis al la eksterlandaj vojaĝantoj, ke oni tre malkaŝe kritikis la nunan reĝimon.

El la Presservo de I.A.K. trad. T. E. Klijn.

---

"LA BROCHURO MENSUELLE"

En niajn manojn venis n-o 163-164 de la franclingva broŝuro "La Brochure Mensuelle", kiu per sia modesta eksteraĵo k digna enhavo vekis ĉe ni apartan atenton. La menciita n-o enhavas mencion pri la enhavo en ĉiuj ĝis nun aperitaj n-oj, el kiu oni vidas, ke la broŝuro dum sia estado estis vera trezoro en la propagando por la liberecanaj ideoj. Ĝi publikigis longan vicon da sciencaj, teoriaj k soci-filozofaj verkaĵoj. Krome ĝi enhavas tutan adresaron pri liberecana gazetaro. Ni rekomendas la broŝuron al ĉiu, scianta francan lingvon.

Adreso: BIDAHULT, 39, Rue de Bretagne, PARIS.

B

---

ATENTU!

Ĉar la red-komitato ne konsistas el lingvospertuloj ni petas la diverslandajn gek-dojn traduki al Esperanto alvokojn, artikolojn aŭ menciojn pri libroj k broŝuroj, kiuj vi deziras publikigotaj en Laboristo.

Tio koncernas ĉiujn barbarlingvojn krom la skandinavaj, nederlanda, juda, hebrea k germana lingvoj.

red.

KAMARADOJ OBSERVU!

Ĉar Laboristo pro sia eteco, kiun ni bedaŭre ne povas ŝanĝi pro ekonomiaj k teknikaj kaŭzoj, ne povas redoni la enhavon en "Informa Bulteno", ni publikante la alvokon el la Bulteno petas la gek-dojn turni sin rekte al la subaj adresoj:

GRAVA RIMARKIGO

Ni sciigas al multaj gek-doj, kiuj sendis monon al ni, k ankaŭ al tiuj, kiuj demandis "kien sendi monhelpon", ke ili ne sendu ĝin al nia adreso en Hispanio pro la senvalorigo de la peseto.

La tuta mono devas esti sendita al la internacia adreso: A. GANIN, -Rue Belleville 41, PARIS-19 Francio.

Kiam vi ion sendis bonvolu sciigi tion al ni perletere. Ne forgesu rimarkigi en via monsendo, ke estas por "Esperanto Bulteno" C.N.T-F.A.I.

Ni ege petas al ĉiu k-do. kiu ricevas nian Bultenon, ke ili sciigas tion al ni. Male ni ne plu sendos ĝin konsiderante ke ili ne ricevas ĝin.

Samtempe ni kore dankas la gek-dojn, kiuj respondis nin per helpaj, solidarecaj k kuraĝigaj leteroj.

Ankaŭ ni sciigas, ke ekdenun ni sendos la Bultenon al ĉiu, kiu havas intereson pri ĝi kun la celo publikigi ĝian enhavon en nacilingvaj ĵurnaloj. Tial ni esperas, ke vi skribos al ni

Ni sendas ĝin senpage, sed necesas afrankmono. Sendu respondkuponojn; unu sufiĉas por 5 sinsekvaj ekzempleroj.

Nia adreso: "Seccion Esperantò", Casa C.N.T -F A.I. Via Layetana 32-34, BARCELONO.

---

MONDONACOJ AL "INFORMA BULTENO" PERE DE "LABORISTO":

Laborista Esp-Klubo, Malmö, 23 svedaj kronoj. Hegrenes k edzino, Norvegio, 10 sv. kr. Åkerberg, Stokholmó, 5. Kolektita de k-do Miŝel en Laborista Esp-klubo, Stokholmo, 10. Knut Erikson, Lilliestrom, 2. Anarka Esp-grupo, Gotenburgo, 5. Anarka Esp-grupo, Stokholmo, 10. Kolektita ĉe kunveno de la sama grupo, 8. Diversaj donantoj el Stokholmo, 3:75. Ĉiuj sumoj estas en svedaj kronoj. La tuta sumo estas: 76:75 sv. kr.

El tiu sumo ni jam sendis al niaj hispanaj esperantistoj pere de la pariza ȧdreso: 317 fr. fr.

Dankante al ĉiu doninto ni samtempe turnas nin al la donontoj. NE PROKRASTU DONI VIAN SUBTENON! JU PLI FRUE DES PLI BONE.

La red. komitato

---

La adreso al Laboristo estas: Adrian Person, Stadshagen 13 A nb. STOKHOLMO, Svedio.

Esperanto-Tryckeriet, Sthlm 1936.